nomon „organo de ISAE". Tia organo devas doni favoran abonprezon al ĉiuj abonintoj pere de la Asocio.

### 11. STATUTŜANĜO, MALFONDO

Por statutŝanĝo estas necesaj referendumo kaj aprobo per 2/3 de la respondoj.

Malfondon de la Asocio povas decidi kongresa kunveno per 4/5-a plimulto de la ĉeestantoj. En okazo de malfondo la havaĵo de la Asocio se eble estu uzata por laboro por Esperanto inter scienculoj.

061.22(ISAE)

## RAPORTO PRI LA REFERENDUMO

*La referendumo pri la Statuto* okazis dum junio kaj julio 1958. Alvenis entute 62 respondoj. Ĉiuj akceptis la Statuton ĝenerale, kaj en la detaloj 12 el ili havis rimarkojn. Iuj rimarkoj koncernis nur stilan plibonigon (kaj la preserarojn) kaj kelkaj tuŝis la esencon. Por ke oni utiligu bonajn rimarkojn ĉe la estonta statutŝanĝo, notu la ĉefajn:

La celon de la Asocio plidetaligi (precipe apliko de scienca propagando — 3-foja rimarko).

Ne postuli „sciencan reputacion" de ĉiuj membroj (3-foja rimarko — oni fakte jam nun faras tiel, pli larĝe ol la Statuto indikas!).

Eksiĝo povus okazi sen la anonco — sufiĉas nepago de la kotizo (2-foja rimarko).

Gvidantoj de la Komisionoj kaj de la Centroj ne rajtas voĉdoni ĉe la elekto de la Estraro.

La antaŭaj prezidantoj de la Asocio estu dumvivaj komitatanoj.

La rilatoj kun UEA kaj aliaj organizaĵoj devas eniri la Statuton.

Kelkaj aliaj rimarkoj venis pro miskompreno, ekz.: estas neniu kontraŭdiro kiam aprobanto *ne devas* kaj *rajtas* aboni la revuon; la filioj rajtas decidi pri sia aldonkotizo (malgraŭ manko de tia frazo en la Statuto); se la membroj postulos la statutŝanĝon, la Estraro certe pritraktos la demandon, k.s.

*Pri la „Bulteno"*, kiel konstanta ligilo inter la membroj kaj la Estraro, venis nur 26 respondoj. El ili 19 estis por la konstanta Bulteno, 2 estis kontraŭ kaj 5 estis por ĝia aperigo nur en tre grava kaj tre urĝa okazo.

La ĝenerala sekretario, B. Popoviĉ.



4.089.2 : 001(492)

## ESPERANTO KAJ LA SCIENCO EN NEDERLANDO

En S.R. 9 153 mi iom detale raportis pri diskuto okazanta en „Wetenschau en Samenleving", la organo de la Verbond van Wetenschappelijke Onderzoekers (Asocio de Sciencaj Esploristoj). La diskuto ankoraŭ daŭras. En la numero de aprilo 1958-a s-roj M. Brouwer kaj G. J. Meinsma verkis artikolon pri „A-lingvo, B-lingvo aŭ X-lingvo?" en kiu ili „pridubas la celtrafecon de internacia helplingvo kiel Esperanto por internacia scienca pensinterŝanĝado" kaj opinias ke oni devas daŭrigi la uzadon de naciaj lingvoj kaj pliampleksigi kaj plibonigi la „tradukaparaton".

Je tiu artikolo reagis en la junia numero tri esperantistoj, d-roj C. P. Gunning, G. Hamming kaj P. Hartman, per tri artikoloj (Mondlingvo necesas, ankaŭ por la scienco; Lingva premo, Esperanto, kaj maŝina lingvo; Esperanto kiel X-lingvo) kun entute preskaŭ 5 paĝoj. En la sama numero la sekcio Utrecht de la Asocio raportas pri sekcia diskuto pri la temo.

En la septembra numero la lingvisto Prof. d-ro Stutterheim, neesperantisto, laŭ invito de la redakcio verkis 5-paĝan artikolon pri „Esperanto kaj Lingvoapreco" en kiu la aŭtoro strebas al objektiveco. Ĝenerale li ne kontraŭas la argumentojn de la Esperantistoj; li nur polemikas kun d-ro Hamming, kiun li kredeble iom miskomprenis. Fine, en la novembra numero la prezidanto de la redakcio, m-ro G. H. Slotemaker de Bruine publikigas deklaron de la redakcio, kies tradukon mi publikigos en proksima numero de S.R. Sekvas tiun deklaron bonega artikolo de d-do G. F. Makkink sub la titolo „Kio okazos nun?", en kiu li insistas pri la urĝeco de la problemo, kiu postulas solvon, nun; ni ne povas plu permesi al ni la lukson de senrezultaj teoriaj diskutoj, en kiuj jam multaj scienculoj poreterne ridindigis sin.

W. P. Roelofs.

0.61.22(ISAE) : 655.4

061.22 = 089.2(100) : 378.18(STELO)

## ALIAJ INFORMOJ DE LA KONGRESO EN MAJENCO

*La dua kunveno de ISAE* pritraktis la problemon de *Popularscienca Biblioteko de ISAE*. La ĉeestantoj konkludis ke tia biblioteko estas tre bezonata kaj ke popularsciencaj libroj trovos bonan merkaton. Oni nur atentigis pri la bezono kontaktiĝi antaŭe kun la eldonejo *„Stafeto"*, ĉar ĝi havas similan intencon.

*STELO* (Studenta Tutmonda Esperantista Ligo) estis fondata dum la kongreso, kiel la studenta sekcio de ISAE. Studentoj kiuj kiel individuaj membroj de ISAE aliĝas pere de STELO pagas favoran kotizon de nur 20 steloj (5 steloj por membreco kaj 15 steloj por la abono al *Scienca Revuo*).